# ESPERANTO aktuala

**INFORMILO de la ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO**
**n o v e m b r o - d e c e m b r o  2 0 0 7**

# Zamenhof-festo!



Kiel ĉiujare, dank'al la sindona laboro de S-inoj Françoise PELLEGRIN k Nelly k Clara BRACKE, nia grupo festos la naskiĝtagon de nia Majstro per aranĝo sub la signo de la lando de la venonta Universala Kongreso, do nia najbara Nederlando, **sabaton la 15an de decembro 2007, de la 11h30 ĝis la 18h, en la kultura centro DE ZEYP, Zeypstrato 47, 1083 Ganshoren (Bruselo** – planon vidu dorsflanke**).**

Por elvoki Nederlandon, ni ŝatus ke vi aldonu ion tiurilatan al viaj vestaĵoj aŭ ke vi vestu vin per oranĝa koloro.

Dum la distra programo, ni regalos vin interalie per skeĉoj kaj recitalo de nederlanda muziko. Ni ankaŭ bonvenigos faman folkloran grupon el Nederlando: De Hakkespits.




La libro-servo de FEL tenos standon ĉe la festo.

Se vi posedas <u>lotojn</u>, bonvolu kunporti ilin por la <u>tombolo</u>

**Aliĝprezo : nur distra programo (posttagmeze) : 5 €**
**aperitivo, lunĉo, distra programo : 15 €**
Pagenda ĝis la 7a de decembro al la konto 000-0123048-52 de EBG

***GRAVE : por plej bone organizi la feston, ni nepre devas scii sufiĉe frue kiu partoprenos la manĝon. Enskribu vin tuj ĉe la organizantoj: patrick.pellegrin@skynet.be (tel 02/358.27.28)***

**Se vi venos aŭte,** eblos parki ĉe Zeypstrato (v. planon)
**Metroe** veturu ĝis stacio Simonis, kaj de tie pluiru per buso 87, kiu laŭiras av. van Overbeke; elbusiĝu je halto Nereus.




**Ni atendas vin, multnombrajn kaj entuziasmajn!**

# Perreta kontakt-ebleco

**Membroj havantaj retpoŝtan adreson estas petataj sciigi ĝin al la sekretario helene.falk@skynet.be , por ke la Grupo povu kontakti ilin rapide en okazo de bezono. Se vi ne havas ret-aliron, vi povas indiki ankaŭ ret-adreson de amiko aŭ najbaro (kompreneble, kun ties konsento!).**

**Ne timu - ni ne intencas priŝuti vin per reklamoj. Tiu ebleco estos uzata *nur* en okazo de bezono.**

**Aliflanke, se vi volas ricevi regule mesaĝojn pri la vivo de la Grupo kaj ĝenerale pri Esperanto en Bruselo, ni forte rekomendas ke vi aliĝu al la dissendo-listo esperanto-en-bruselo@yahoogroups.com Tiucele, sufiĉas sendi malplenan retmesaghon al jena adreso:**

**esperanto-en-bruselo-subscribe@yahoogroups.com**

**Baldaŭ poste, vi ricevos konfirmo-peton. Sufiĉos respondi al ĝi (ech per malplena mesaĝo), kaj vi estos aliĝinta. De tiam, vi ricevados la mesaĝojn de la grupo kaj povos mem dissendi al la grupanoj, sendante viajn cirkulerajn mesaĝojn al la jam citita adreso esperanto-en-bruselo@yahoogroups.com**

**Vi povas tamen uzi pli da eblecoj se vi unue kreas Yahoo-konton (senpagan) por vi, vizitante la retpaghon http://groups.yahoo.com, klakante sur "New user? Sign up" kaj sekvante la (anglalingvajn) instrukciojn. Akirinte Yahoo-konton, vi povos alighi al kiu ajn Yahoo-grupo (estas pli ol mil listigitaj sub la shlosilvorto 'esperanto', i.a. la tutlanda dissendo-listo esperanto-en-belgujo. Post tio, vi povos aliri la pasintajn mesaghojn de viaj elektitaj grupoj, ties deponitajn dosierojn, fotojn k.s. , kaj ankaŭ mem deponi dosierojn kaj fotojn je dispono de la listanoj.**

**Memoru fine pri nia retpaĝaro http://users.belgacom.net/EBG kaj pri la grupa blogo http ://ebg.skynetblogs.be**

# Aĉetu nian jubilean libron !

**Okaze de la centjariĝo de nia Grupo, Hélène FALK kunmetis nepre havindan volumon kun ampleksa tekst- kaj foto-materialo pri la lastaj 50 jaroj de ĝia vivo (inkl. la Bruselan UKon de 1960). Se vi ne jam akiris, mendu ĉe la kompilintino helene.falk@skynet.be , tel. 02-3584214.**

## Ĝi kostas nur 10 eŭrojn!

---

# Programo de la venontaj semajnoj

**Novembro**

| | |
|---|---|
| 21 | Sentema kunveno |
| 28 | Michael CWIK pri la Jokohama Kongreso (kun bildoj) |

**Decembro**

| | |
|---|---|
| 5 | Preparo por la Zamenhof-festo |
| 12 | Preparo por la Zamenhof-festo |
| 15 | Zamenhof-festo (v. unuan paĝon) |
| 19 | Bilanco de la jaro (ne nur el esp-ista vidpunkto!) |

**Inter Kristnasko k Epifanio okazos nek kunvenoj, nek kursoj. Feliĉan novan jaron!**

**Januaro 2008**

| | |
|---|---|
| 9 | Revid-kunveno |
| 16 | Kion vi atendas de nia bulteno? |
| 23 | Lingva vespero – preparu viajn demandojn! |
| 30 | ???? |

Se vi trovas la programon de niaj kunvenoj iom senenhava, vi ne nepre malpravas. Prezentu do viajn proprajn ideojn! Proponu prelegojn (de vi mem aŭ de eksteruloj, kiujn vi povus venigi), ludojn, kantojn, grup-vizitojn, ekskursojn eĉ.
Ne atendu ideojn nur de la (jam iom laca) estraro!

# Kial malsamas ĉi tiu numero?

**Kiel anoncite jam antaŭ la somero, nia kara S-ino Hélène FALK, kiu tiel konscience redaktadis kaj tiel akurate aperigadis nian bultenon de post la subita morto de Eugène Collet antaŭ 17 jaroj, decidis pro aĝo kaj laciĝo ĉesigi tiun laboron. Leviĝis momente duboj, ĉu entute papera ligilo estas ankoraŭ bezonata en nia interreta epoko; sed ne ĉiu spertas pri moderna tekniko kaj ne ĉiu havas interretan konekton hejme – kaj finfine sin proponis Sro Paulo BRANCO, portugalo, kont-revizoro ĉe la Konsilio de EU kaj delonga esperantisto, por transpreni la redaktoran taskon ekde la venonta jaro. Intertempe, ĉi tiun numeron kunmetis kaj dissendis via prezidanto; do se vi trovos ĝin iom magra, direktu kritikojn al li.**

**Ekde januaro, la nova redaktoro bezonos ĉiun eblan helpon. Viajn sugestojn kaj kontribuojn direktu al li, ĉu helikpoŝte (rue Froissart 29, 1040 Bruselo), ĉu retpoŝte paulo.branco CHE consilium.europa.eu**

# Jam temp' está... (re)kotizi!




- **Pagu al la poŝta konto 000-0123048-52 de la Esperantista Brusela Grupo**
- **Por efike subteni nian agadon, estas konsilinde membrigi ankaŭ siajn familianojn, se ili ne rekte kontraŭas Esperanton !**
- **Membroj de EBG loĝantaj ekster Belgio bv. aldoni 3 eŭrojn pro la pli altaj sendokostoj.**
- **EBG peras kotizojn al APE, FEL au UEA nur por siaj propraj membroj kaj nur ĝis februaro!**
- **Nepre indiku la celon de via pago per literaj [aŭ, se vi ĝiras telefone, ciferaj] kodoj, ekz. "MEM + APE" aŭ "11 21"**

**Aktualan kotiz-tabelon por 2008 vi trovos dorsflanke. Vi tre faciligos la laboron de la kasisto se vi kotizos ĝis fino de januaro.**

# KOTIZ-TABELO 2008

| Nro | Kodo | Kategorio | Kotizo (EUR) | Rajtoj |
|---|---|---|---|---|
| **ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO** | | | | |
| 11 | MEM | Membro de EBG | **10** | abono al "Aktuala" (organo de EBG) + partopreno en la vivon de la Grupo |
| 12 | MEM-R | Membro - junulo (ĝis 26-jara) | **5** | |
| 13 | MEM-S | Membro - pensiulo, senlaborulo | **7** | |
| 14 | FAK | Familia kunloĝanto | **2** | partopreno en la vivon de la Grupo |
| 18 | DVM | Dumviva membro de EBG | **250** | Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo |
| **BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ** | | | | |
| 21 | APE | Membro de "Association pour l'espéranto" (valona) | **14** | Abono al "Inter Ni" (parte franclingva) |
| 22 | FEL | Membro de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) | **25** | Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva) |
| **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO** | | | | |
| 31 | SA | Simpla abonanto de "Esperanto" | **37** | Abono al "Esperanto", monata organo de UEA |
| 32 | Kto | Simpla abonanto de "Kontakto" | **23** | Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA |
| 33 | MJ | Membro de UEA kun "Jarlibro" | **23** | Membreco en UEA + "Jarlibro" |
| 34 | MA | Membro-abonanto de UEA | **58** | MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato ! |
| 35 | MG | Membro de UEA kun "Gvidlibro" | **9** | Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj) |
| 36 | SZ | Membro de Societo Zamenhof | **116** | Membreco en Societo Zamenhof (honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEAn) |
| 37 | MD | Dumviva Membro de UEA | **1450** | MA de UEA dum la tuta vivo! |